

STARTO

N-ro 4/2015 (257)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



La 15-a anstataŭa kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio

Ústí nad Orlicí 6 – 8 novembro 2015

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz

Identec-numero (IČ): 00 44 30 34

Starto retpoŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Vacenovice 398, 696 06 Vacenovice, melicharkova8@seznam.cz

Libroservo: Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, pri informadiko (memstariĝis: AEH, junulara, fervojista)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupo@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj: Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova@centrum.cz

BANKO-KONTO de ĈEA:

2800 186 228/2010

Fio banka Svitavy

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Vladimír Dvořák, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 999 091, vladimir.dvorak@esperanto.cz, (gvidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj inkl. UEA, EEU)

Vicprezidentino: Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, libuse.dvorakova@esperanto.cz (Muzeo de Svitavy, rilatoj al urbo Svitavy, muzea kaj ekspozicia grupo)

Kasisto: Vratislav Hirsch, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, tel. 517 444 117, vratislav.hirs@esperanto.cz (membrodatumado, kontakto)

Komitatanino: Pavla Dvořáková, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 942 424, pavla.dvorakova@esperanto.cz (membroj, kluboj, sekcioj, konferencoj, informado, retaj projektoj, ekspozicioj)

Komitatano kaj redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. UPC 530 319 263, miroslav.malovec@esperanto.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

Komitatano: Miroslav Hruška, Haškova 2, 638 00 Brno, tel. 608 224 993, miroslav.hruska@esperanto.cz (junularo, komputila klerigado, teknika subteno, redaktado)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio kaj UK-peranto: Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, chrdle@kava-pech.cz

Revizia komisiono de ĈEA:

Prezidanto: Jan Řepa (Fidel), Na Valše 250, 38411 Netolice, fidel@razdva.cz

Věra Gavandová, Komenského 657, 789 61 Bludov, vgavandova@email.cz

Ludmila Srbová, Prodloužená 264, 530 09 Pardubice, ludmila.srbova@seznam.cz

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorferdomo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz, www.muzeum.esperanto.cz

Kontrollegis: la komitato, K. Votoček, V. Türk

Anstataŭa 15-a ĈEA-kongreso

Ústí nad Orlicí gastigis de la 6-a ĝis la 8-a de novembro 2015 la anstataŭan 15-an kongreson de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, al kiu venis 58 delegitoj el la tuta respubliko. La kongresejo trovis lokon en Junularhejmo de Artindustria Mezlernejo.

Vendrede vespere en la manĝejo okazis klarigo kaj diskuto pri necesaj ŝanĝoj en la asocia statuto rilate al la nova Civitana Kodekso (leĝaro), laŭ kiu nia asocio devas fariĝi registrita societo (ĉeĥe: *zapsaný spolek*). Ankaŭ kluboj kaj sekcioj kun derivita jura memstareco (jure memstaraj, sed uzantaj la asocian statuton) devas fariĝi registritaj societoj — filiaj societoj de ĈEA (*pobočné spolky ČES*). Por ses tiaj filiaj societoj estis preparita speciala klarigo en unu el la klubejoj. La ceteraj kongresanoj dume spektis en la manĝejo filmon pri Karel Čapek kaj eksciis pri novaj libroj, poste ĉiuj kantis ĉe gitaro, aŭskultis violonon de Jan Duda aŭ faris aĉetojn en Libro-servo en angulo de la manĝejo.



Alparolo de la urbestro

La sabatan oficialan inaŭguron de la kongreso ĉeestis ankaŭ la urbestro kaj aŭspicianto Petr Hájek, kiu bonvenigis la kongresanojn kaj deziris agrablan restadon en la urbo. La urbo subtenis la

kongreson per 12.000 kronoj kaj esperantistoj promesis propagandi la urbon eksterlande. Post la urbestra saluto estis prezentita filmeto pri Ústí nad Orlicí, kiun esperantigis kaj paroligis Vladimír Tůrk el Netolice. Sekvis salutoj de Ján Vajs el Slovacia Esperanto-Federacio, de Ladislav Kolář kiel reprezentanto de ĉeĥaj fervojistoj kaj de Lenka Angelová el AEH.



Vladimír Dvořák poste informis pri decidoj de la kongreso en Svitavy antaŭmonato, Libuše Dvořáková pri la agado en la muzeo, kiu jam estas plenplena de materialoj eĉ en la deponejo.



La libroservo funkciis dum la tuta kongreso

Miroslav Malovec prezentis laboron de la grupo por ciferecigado de nia kultura heredaĵo, Vratislav Hirš klarigis situation de nia membrobazo kaj Miroslav Hruška rakontis pri preparo de ĈEA-Retkomunikoj.

Vladimír Dvořák prezentis laboron de la Komitato, Pavla Dvořáková plenumadon de prioritatoj kaj la raporton pri la agado de nia asocio ekde la lasta konferenco. Poste Vratislav Hirš informis pri la asociaj financoj kaj Petr Chrdle pri rektaj membroj de UEA.

Post mallonga paŭzo kun violonado de Jan Duda estis pritraktitaj ŝanĝoj en la asocia statuto.



Sabata posttagmezo estis dediĉita al promeno tra la urbo kun s-ro Skalický el la Urba Muzeo. La promeno preter la urba teatro, preĝejo de Ĉieliro de Virgulino Maria (tie Miroslav Smyčka kantis psalmon de Antonín Dvořák) kaj tra la urba placo finiĝis en la Urba Muzeo, kie antaŭ la trarigardo de la kolektoj okazis mallonga renkontiĝo kun poetino Věra Ludíková, Esperanto-amikino naskiĝinta en Ústí nad Orlicí.




Antaŭ la vespermanĝo inĝ. Ján Vajs el Slovakio informis pri preparoj de la 101-a UK en Nitra 2016 kaj geedzoj

Dvořák prezentis planojn pri 5-taga oficiala Antaŭkongresa ekskurso. Pluraj ĉeestantoj tuj aliĝis kiel helpantoj, ĉiuj ricevis propagandajn materialojn.



Post la vespermanĝo nevidanta s-ro Jan Příborský prelegis, kial nevidantoj amas vojaĝadon, kvankam ili povas ĝui ĉion nur per palpado, flaro kaj priskribo de amikoj. La nevidanta muzik-instruisto Jiří Jelínek prezentis plurajn koncertaĵojn por gitaro kaj akompanis kantadon de sia edzino Milena. La reston de la vespero plenigis danc-amuzo (unu kantisto kun elektronika orgeno) kaj tombolo.

La dimanĉa antaŭtagmezo alportis kelkajn informojn, ekz. pri esperantigado de la retejo VEDEM pri judaj infanoj en la geto de Terezín dum la militaj jaroj (<http://www.vedem-terezin.cz/eo/>), tamen la ĉefa programo de la traktado estis kadra laborplano, redaktado de la Regularo pri asociaj elektoj kaj de la Kongresa Rezolucio.



Miroslav Malovec

fotoj:

Pavla Dvořáková

Libuše Dvořáková

O.A.Fischer

Jaroslav Liška

Elŝuteblajn fotoĵojn el la kongreso vi povas trovi en

www.muzeum.esperanto.cz/cs/galerie.

La plej juna partoprenanto

Schváleny nové stanovy

Základním dokumentem, který sjezd schválil, byly nové stanovy. K úpravám bylo třeba přistoupit v důsledku přijetí nového Občanského zákoníku a také v důsledku praxe v chodu našeho svazu.

Definitivní verze ještě podléhá schválení Krajským soudem v Hradci Králové, pobočka v Pardubicích, kde jsem o zápis nezbytných údajů i nových stanov již požádal. Předkládaná verze v plném znění je k dispozici na webu:

<http://www.esperanto.cz/cs/kontakty-a-organizace/cesky-esperantsky-svaz/co-je-ces>.

Mezi hlavní změny patří:

- úprava počtu pro usnášení na 25 osob,
- doplnění zkratky z.s. (zapsaný spolek) za název organizace,
- možnost 3-9 členů výboru v závislosti na situaci,
- ustanovení předsedy jako individuálního statutárního orgánu,
- vynětí revizní komise ze stanov s možností jejího ustavení každoročně členskou schůzí,
- ustavení Muzea esperanta jako samostatné složky bez právní osobnosti,
- mnohé pojmové úpravy vynucené novelizací Občanského zákoníku (členská schůze, právní osobnost, pobočné spolky),
- přesnější vymezení pobočných spolků vč. způsobu jejich registrace a provádění změn,
- způsob vedení evidence členů.

Podrobné zdůvodnění prováděných změn, diskuze o nich a drobné úpravy pak byly předmětem večerního (v pátek) a dopoledního (v sobotu) programu a je

potěšitelné, že kromě 1 hlasu byly nakonec stanovy přijaty všemi přítomnými členy.



Závěrem bych chtěl poděkovat všem, kteří se svými radami a návrhy na konečném znění podíleli. Celkovou koncepci jsem zpracovával především s T. Břicháčkem, přičemž dalšími přispěvateli byli P. Chrdle, V. Štěpánová či V. Kočvara, ale i další. Po jazykové stránce stanovy sjednotila M. Turková.

Díky jim i dalším nejmenovaným za aktivní pomoc na dokumentu, který snad bude sloužit mnoho dalších let!

Vladimír Dvořák, předseda

Ukázka stanov - úvodní ustanovení

1. Český esperantský svaz, z.s. (dále jen „Svaz“) je spolkem podle občanského zákoníku. Zkratka „z.s.“ znamená „zapsaný spolek“.
2. Název spolku je Český esperantský svaz, z.s.
3. Název Svazu v esperantu zní „Ĉeĥa Esperanto-Asocio“.
4. Svaz sídlí na adrese: náměstí Míru 81/1, Svitavy, PSČ 568 02.
5. Svaz působí na území České republiky.
6. Jednacími jazyky Svazu jsou čeština a esperanto.

Raporto pri plenumado de prioritatoj de ĈEA

1a - Esperanto-Muzeo en Svitavy

La muzeo estas plu en senpaga luo en Ottendorfer-Domo posedata de la urbo Svitavy, rekompence al senpaga certigo de la funkciado kaj al diskonigo de la urbo (precipe eksterlande). La nuntempa kontrakto finiĝos en 2016. Ekipo de la muzeo estas plejparte posedaĵo de ĈEA, kiu samadrese havas ankaŭ sian oficialan sidejon (kvankam ne oficejon). Funkciadon de la muzeo certigas Muzea kaj Ekspozicia Grupo de ĈEA kun Klubo de Amikoj de Esperanto Svitavy. Kaj la grupon, kaj la klubon gvidas Libuše Dvořáková. Krome aktivas: Pavla Dvořáková (ekspozicioj, muzeaj retejoj kaj virtualaj kolektoj, artikoloj, subvenciaj programoj), Marie Čumová (biblioteko, arkivo, Libroservo), Miroslav Malovec (literaturo kaj historio, ciferecigo de libroj kaj arkivaĵoj, tradukoj), Petr Chrdle (eksterlandaj rilatoj, libroj) kaj ceteraj. Funkciadon de la muzeo kaj organizajn laborojn por aranĝoj certigas la loka klubo, kiu uzas la ejon ankaŭ por siaj aktivecoj. En la ĉambro okazas aranĝoj organizataj de ĈEA kaj de la klubo (inkl. de lingvokursoj gvidataj de M. Minářová). Aranĝoj de internaciaj organizoj ĉi-jare ne okazis.

Ekspozicioj kaj aranĝoj

La ĉefa publika frukto de la muzea laboro estas ekspozicioj: ĝis 20.9.2015 daŭris *Esperanto kaj kolektado* kaj ekde 26.9. *Kun Esperanto ĉirkaŭ la mondo* (kun riĉa akompana programo - vidu apartan artikolon ĉi-numere). Plifirmiĝis kunlaboro kun Sekcio de nevidantoj de ĈEA - krom registrado de KDo geedzoj

Jelínek kontribuis al muzika kaj prelega programo de la inaŭguro. Ili kaj J. Příborský prezentiĝis ankaŭ dum la Anstataŭa 15-a Kongreso en Ústí n.O.

Por realigo de la aranĝo ĈEA-estraro sukcesis ricevi subvencion 10.000,- Kč de la regiono Pardubice. Efika montriĝis strategio kompletigi la programon per neesperanta temo por la publiko - ĉirilate *Ekoturismo per ĉiuj sensoj*. Minuso de la ĉi-jara ekspozicio estas malpli alta kvanto de vizitantoj kaj ankaŭ pli malgranda intereso de ekspoziciemuloj. Aranĝoj en la muzeo organizataj de la klubo: La 7-a Marcipana Kristnasko (gvidata de geedzoj Vyšinka el Vracov - 1000 vizitantoj tage), Posttagmezo de tabloludoj, posttagmeza programo de la Regiona renkontiĝo, diskuto pri Ĉinio kaj tradicia ĉina teceremonio (far gastinoj el Ĉinio). Ekde 2014/11 okazis 13 vojaĝvesperoj de la Asocio Brontosaurus Svitavy.

El la eksterlandaj vizitoj menciendas precipe 12-membra grupo el Francio, vojaĝinta tra Ĉeĥio, kun kiu distrikta televido en la muzeo filmis en septembro intervjuon. En marto la muzeon vizitis partoprenantoj de junulara aranĝo CENTREJO.

Biblioteko, arkivo kaj Libroservo

Informoj pri la biblioteko kaj aktualaj katalogoj troviĝas en

www.muzeum.esperanto.cz.

M. Čumová ĝis nun enkatalogigis pli ol 16 000 bibliotekajn unuojn (pli ol 2 000 dum unu jaro). Alirebligado de la biblioteko estas parto de la prioritato 1c. En oktobro 2015 Muzea Grupo sukcesis en subvencia alvoko de la Fondaĵo Bachrich kaj ricevis 10 valorajn librojn en sumo de 133 eŭroj (vidu aktualaĵon en esperanto.cz).

Ĉar la spaco de la muzea ejo ne plu sufiĉas, multoblaĵoj, gazetoj kaj parto de la libro kolekto troviĝas ankaŭ en du deponejoj (unu nova en Ottendorfer-Domo, la dua en alia parto de la urbo). En la deponejo laŭbezone helpas precipe M. Nárožný aŭ J. Bobřík. Bedaŭrinde ankaŭ la disponebla spaco komencas pleniĝi kaj Muzea Grupo devas solvi la problemon. Ankaŭ Libroservo ekde 2014 troviĝas en Svitavy (prizorgas M. Čumová). Intereso pri libroaĉetado estas daŭre relative malalta. Plej multaj aĉetoj okazas kadre de konferencoj/kongresoj. Estis elektitaj libroj el la kolekto de duoblaĵoj disponigitaj kun granda rabato dum la ĈEA-Kongreso en Ústí n. O. Pluraj libroj plu disponeblas senpage por bezonoj de kluboj.

Kontakto:libroservo@esperanto.cz

En 2015 okazis transporto de materialoj el la Domo de Kilián en Třebíč al deponejo en Svitavy. M. Malovec okupiĝis pri ordigado kaj pretigo por ciferecigo. Estas preparata listo de titoloj donaceblaj al publikaj bibliotekoj (kiuj montros intereson pri ili).

Virtualaj kolektoj

Muzea infopanelo kaj kolektoj en la muzea komputilo estis en 2015 senŝanĝaj. Ĉe www.muzeum.esperanto.cz aperis 6 novaj fotogalerioj precipe lige al la temo "kolektado". La muzea paĝo

<http://www.ipernity.com/doc/181031/> ĉe Iperity havis lastjare pli ol 17 000 virtualajn vizitojn. Alŝutado de novaj dosieroj malrapidiĝis. Nuntempe haveblas ĉ. 1 600 dosieroj en 42 albumoj, en la reto de la muzeo estas ĉ. 2 300 membroj el 95 landoj, tamen ĝenerale vigleco de Iperity-anoj iom malpliĝas. La dosieroj spekteblas ankaŭ por nemembroj de Iperity.

Ĝenerala informado

La muzeo estis tutjare diskonigita en Facebook, pere de la muzea paĝo, grupo de amikoj de la muzeo, ĝeneralaj Esperanto-grupoj, en esperanto.cz, Retkomunikoj kaj apartaj artikoloj.

Nove la muzeo estas registrita en la datumbazo museum.cz kaj estas finata registriĝo al adresaro de la Asocio de Muzeoj kaj Galerioj (pro financa motivo kiel nemembro). Estas supozata ioma fortigo de la prestiĝo kaj pli granda publika videbleco ĉe la publiko.

Muzea Grupo kun J. Řepa prizorgis dublado de filmo pri Svitavy en la urba videostudio (kun financa subteno de la urbestro D. Šimek). La filmo spekteblas en Youtube kaj estis eldonita far ĈEA por bezono de informado dum la UKo en Lille.

1 b – ekvilibra budĝeto – en Starto 1/2016

1c - projekto Fonoteko

En aprilo 2015 kvarfoje okazis seminario "Sabla printempo" kadre de la seminario en Skokovy, kie P. Dvořáková kaj J. Malá trejniis interesitojn pri sonregistraĵoj. Registraĵoj el komuna kantado estis publikigitaj en la nove fondita ĈEA-kanalo en la retejo Soundcloud. Malgraŭ preteco de ĈEA disponigi bezonatan subtenon, bedaŭrinde aktiva intereso de kluboj aŭ unuopuloj okupiĝi pri sonregistraĵoj mankas. Pluraj ĈEA-membroj (grandparte J. Malá kaj V. Türk) partoprenis en sonregistrado por la nova lernolibro de P. Chrdle. Kompletaj sonregistraĵoj de *Rakontoj el la dua poŝo* de K. Čapek troviĝas en la paĝo de Vladimír Türk en Iperity. Samloke disponeblas ĉ. 20 mallongaj videoj el la kultura programo de Postferia Renkontiĝo en

Netolice (M. Smyčka - V. Türk - J. Řepa - P. Dvořáková - P. Chrdle - J. Malá).

Verŝajne unuafoje estis filmita Psalmo 23 de A. Dvořák en interpreto de M. Smyčka. Geedzoj Jelínek kaj Karaš el Sekcio de nevidantoj registris 17 kantojn por KDo, kiun ĈEA pretigas por eldono. 2 specimenoj estis publikigitaj en la muzea paĝo ĉe Ipernity. Realiĝis du registraĵoj de P. Dvořáková pri muzikigita poezio (Zamenhof – *Ho mia kor'*, Sova – *Pastoralo*) kaj fama kanto de J. Nohavica – *Je la kvina en maten'* (en traduko de Edita Dvořáková kaj interpreto de V. Türk). Dublitaj al Esperanto estis 3 dokumentaj filmoj: *Svitavy – malferma kaj movoplena urbo* (J. Řepa – CMS Svítavy, trad. M. Malovec), eldonita de ĈEA kiel DVD, *Vivo kaj epoko de la verkisto Karel Čapek* (V. Türk – P. Dvořáková) kaj *Ústí nad Orlicí prezentiĝas*" (V. Türk). Pliaj kontribuantoj por la projekto estas daŭre serĉataj.

1d Alirebligo de la biblioteko kaj de la ciferecigita literaturo al la membraro kaj al la publiko

Kadre de la preparo de la nova statuto de ĈEA okazis intensa diskuto pri la jura pozicio de la Esperanto-muzeo. Surbaze de analizo de praktiko de similaj institucioj kaj de la realaj laborfortoj de ĈEA la muzeo restas organiza unuo de ĈEA sen propra jura memstareco.

Pruntoregularo de la ĈEA-biblioteko estas preparata surbaze de la diskuto dum KAEST 2014 kaj precipe laŭ modelo de la Ministerio pri kulturo. Pruntoj nuntempe eblas nur en studejo en la muzea ejo (laŭ la antaŭa interkonsento kun la bibliotekistino M. Ču-

mová). Por aktivaj membroj eblas laŭ individua interkonsento ankaŭ prunto hejmen (se ne temas pri valoraj libroj aŭ materialoj posedataj nur en unu ekzemplero).

Disponigo de ciferecigitaj materialoj. La tutan procedon malrapidigas komplika situacio rilate la aŭtoran rajton – kompetentaj kunlaborantoj pri la temo necesas, sed nuntempe malhavatas. Plua granda problemo ankoraŭ nesolvita estas elekto de taŭga interreta depono kaj kreo de datumbazo taŭga por ĈEA-bezonoj. Teknike kapablaj kunlaboremuoj tiukampe necesas.

En oktobro 2015 en esperanto.cz estis alirebligataj 15 ciferecigitaj jure liberaj libroj de ĉeĥaj aŭtoroj. ĈEA klopodas diskonigi ankaŭ verkojn de siaj membroj (J. Drahotová, M. Turková k.a.).

P. Dvořáková komencis traktadon kun B. Skučková, estrino de departamento pri literaturo kaj bibliotekoj en Ministerio pri kulturo de ĈR, koncerne eblecon de envicigo de ciferecigitaj libroj en Esperanto al kolektoj de Nacia Biblioteko kaj de Urba Biblioteko en Prago. La projekto estas en etapo de postulhava preparo (pro neceso respekti striktajn standardojn kaj normojn).

Grupo por ciferecigado klopodas skani nian kulturan heredaĵon, kiu konsistas el eldonitaj libroj kaj gazetoj kaj ankaŭ el neeldonitaj manuskriptoj (tajpaĵoj) de verkoj, tradukoj aŭ leteroj postlasitaj de jam forpasintaj gravaj esperantistoj. Ankaŭ protokoloj de niaj asociaj, klubaj aŭ sekciaj komitatoj, raportoj pri agado k.s. estas atestoj pri nia historio. La skanado povas savi ilin por la futuro kaj ankaŭ disponigi al la publiko en la interreto. Retajpado de literaturaj tekstoj ebligas ilian reeldonon en nova grafika

aranĝo. Specialaj programoj scias deĉifri la skanitan tekston, kvazaŭ ĝin tajpus tajpistino, nur necesas la rezulton tralegi kaj korekti mistajpojn de la maŝino. Poste oni parolas pri tekstigo de skanaĵo.

La ciferecigado daŭras jam dudek jarojn ekde la Praga Uk. Ĉar tiam ekzistis nur malgrandaj malmolaj komputilaj diskaj, post tekstigo la skanaĵoj estis forviŝitaj kaj restis nur la tajpaĵoj. Tiamaniere estis prilaboritaj preskaŭ ĉiuj esperantlingvaj libroj, kiuj aperis sur nia teritorio ekde 1890. Ankaŭ manuskriptoj de gravaj esperantistoj (Lukáš, Hromada, Pumpr, Kořínek, Omelka, Vondroušek, Kilian, Břehová) estas estas enkomputiligitaj, ofte ankaŭ iliaj unuopaj verketoj aperintaj dise tra la gazetaro.

Nur post kiam aperis grandaj komputilaj diskaj estis eble konservi ankaŭ skanaĵojn (fotojn) de la tekstoj. Unue ni skanis gazetojn ekde Bohema Esperantisto (1901) ĝis la nuntempa Starto kaj poste konservitajn manuskriptojn, protokolojn, bultenojn, leterojn. Al la deponejo de nia muzeo la grupo jam transdonis 26 skatolojn da skanita materialo. Aliaj estas skanataj plu.

La grupon gvidas Miroslav Malovec, membroj estas Vladimír Türk, Pavla Dvořáková, Jaroslava Malá, Jindřiška Dubinová, Karel Votoček, Andrea Hasala, Jindřich Košťálek, lastatempe aliĝis Jan Pospíšil.

La grupo nun klopodas skani arkivaĵojn, kiuj ekzistas en unu ekzemplero, poste presaĵojn, kiuj jam estis tekstigitaj, sed skanaĵoj forviŝitaj (estas bone konservi la originalan aspekton de libroj), tekstigi literature gravajn artikolojn en nia gazetaro, kontroli jam tekstigitajn kaj forigi mistajpojn.

-padv, mm-

Žhavá novinka

Změna názvu svazu

Krajský soud v Hradci Králové – pobočka v Pardubicích, kam ČES svým sídlem náleží, zapsal 25.11.2015 změny požadované novelizací Občanského zákoníku a schválené podzimním náhradním sjezdem v Ústí n/Orl. K zásadním patří zkratka ”z.s” (zapsaný spolek) k názvu a určení předsedy jako statutárního orgánu. Dále jsou zapsány cíle svazu a jeho nejvyšší orgán. Obdobnou aktualizací zápisu u stejného soudu by měly do 30.9.2016 projít i všechny pobočné spolky ČES (4 kluby a 2 sekce).

60 jaroj

de Unesko-rezolucio

Antaŭ ni estas la lastaj semajnoj de 2015. Iom post iom proksimiĝas al la fino dekelkmonataj klopodoj komune festi kaj aktivi por omaĝi la 60-jariĝon de la unua Unesko-rezolucio pri Esperanto el decembro 1954. Tiam la Montevidea Ĝenerala Unesko-Konferenco agnoskis i.a. atingojn por proksimigo de la popoloj akiritajn pere de Esperanto kaj rekonis, ke tio respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko. Ĝi ankaŭ rekomendis al la Ĝenerala Unesko-Direktoro sekvi la evoluon en la uzado de Esperanto sur la scienca, eduka kaj kultura kampoj.

La 16-an de novembro 2015 Unesko, kies Ĝeneralaj Konferencoj en 1954 kaj 1985 du fojojn rezoluciis favore pri Esperanto, fariĝis 70-jara.

*Barbara Pietrzak
UEA-Estrarano pri la Jaro M60*

Setkání s Věrou Ludíkovou

Esperanto – 7. 11. 2015 v Ústí nad Orlicí



Vážení přátelé, vážení účastníci dnešního setkání, dámy a pánové,

dovolte, abych vás i já pozdravila jako společenství lidí, kterých si velmi vážím, abych vás co nejsrdečněji pozdravila v mém rodném městě, v Ústí nad Orlicí, ve východních Čechách, které jsou považovány za lidsky a citově bohaté, a to zásluhou mnoha generací lidí, kteří zde žili, abych vás uvítala ve městě, kde houslovým klíčem otvíráš pokladnici a kam přišli se malíři podívat, jak vypadá krása...

V encyklopedii osobností české současnosti KDO JE KDO v ČR 2002 jako své krédo uvádím: „Píšu a prosazuji duchovní poezii, takovou, která dává naději a světlo a zároveň naplňuje lidskou touhu po dorozumění. Tu dokládá samotná existence esperanta, jazyka hodného poezie, do něhož mám přeloženou

větší část díla. Z téhož důvodu vycházejí mé básně a texty převážně mnohojazyčně“, tolik citát. V encyklopedii jsem dál uvedla, že v esperantu vycházela moje poezie v časopisech českých, v Holandsku a v Číně.

Dlouho, mnoho let jsem zvažovala, co je hodno pozornosti čtenáře a posluchače, jemuž se snad i já mohu cítit být oprávněná něco říci. Kdyby si lidé rozuměli, stýkali by se v přátelství a míru. To byla hlavní myšlenka, která vedla k vytvoření mezinárodního jazyka pro dobro lidstva, esperanta. Dávno totiž lidé hledali takový společný jazyk, který by převzal úlohu až do středověku všeobecně známé latiny, alespoň mezi vzdělanci. Skutečnost, že esperantisté se mezi sebou snadno dohodli, se nelíbila ani gestapu, ani komunistům, unikali totiž cenzorům, stali se proto nepohodlnými.

K esperantu se hlásím jako jeho podporovatelka, ač jím nevládnou. Pravděpodobně to nebyla náhoda, že mě právě esperantisté požádali o svolení překládat mé básně do esperanta a díky nim se také moje poezie mohla šířit dál za hranice našeho regionu. Mezi esperantisty jsem poznala mimořádné osobnosti, nesmírně obětavé, jakou je pan Miroslav Malovec z Brna, či jakým byl básník Čestmír Vidman, nevidomý, nedávno zesnulý. Obdivovala jsem jeho úžasnou energii a jistě vynikající paměť, vždyť celé pasáže musel mít jen v mysli. Byl vlídný, milý, tak si ho pamatuji z návštěv v Palatě, kde své poslední roky žil. K mým přátelům patřila také esperantská básnířka Eli Urbanová, též už nežijící.

Zásluhou překladatelů, pana Miroslava Malovce a již zesnulého pana Jaroslava Mráze, mohla být v roce 1998 vydaná zrcadlově esperantsko-česky knížka vý

běru z mé poezie EKAŬDI LA ANIMON – USLYŤET DUŤI (ukázku v esperantu přednese Ing. Turková)

Spolupráci s esperantisty bych mohla věnovat dlouhé vyprávění, tak úžasné bylo – pan Josef Vích byl kromě překladatele a jazykového poradce i pěvcem Národního divadla. Řadu let účinkoval při autorských čteních z mé poezie, zpíval a seznámil mě s dalšími umělci. Letos na jaře jsme se s ním rozloučili, právě tak s panem Jiřím Paterou, dlouholetým předsedou pražského uskupení esperantistů, jehož zásluhou vycházelo esperantské BULTENO. Do něho pan Patera zařazoval i moji poezii a texty, které přeložil.

Zásluhou překladatelů esperantistů vznikly překlady třiceti trojverší básně Uslyšet duši do řady jazyků: Williama Aulda, skotského básníka do angličtiny, Japonce Kurisu Keia do japonštiny, David Šamgar prostřednictvím esperanta pořídil hebrejský překlad, esperantista Jaroslav Mráz přeložil báseň do ruštiny, Kokou Sagbadjelou z Toga, s níž jsem si několik let psala, přeložil verše do rodného jazyka a Gerrit Berveling do holandštiny. Vznikly tak knížky Uslyšet duši 1 + 10 a Uslyšet duši 1 + 16. Překladatelé dali také vzniknout knížce s překlady textu JE JARO do 36 jazyků, ta získala v pelhřimovském muzeu rekordů čestný titul „Kniha v 37 jazycích“.

Společenství esperantistů patří k nositelům hodnot, kterých bychom si měli vážit, cenit si jich a upínat k nim naději. Může se zdát, že vysoké morální hodnoty našich velikánů jsou pozapomenuty, že mnohé jsou docela zapomenuté. Právě pozapomenuté hodnoty – vědomí si

vlastní ceny, krásného jazyka, krásné české země, kterou pro nás předkové ubránili a my ji přece nebudeme chtít opouštět, sebeúcta, důvtip Čechům vlastní, i s tou trochou švejkování, tvořivost a touha po dorozumění mezi lidmi, to budou devízy ve světě, který se čím dál tím víc globalizuje.

Budme pozorní k těm, kteří dostávají pravomoc nám vládnout. Důležité věci by měli rozhodovat lidé s širokým rozhledem, lidé vzdělaní, lidé moudří, aby už nebyly pochyby o tom, zda naše civilizace nesměřuje k sebezničení.

Vedeni touhou uchovat si lidství za všech okolností a posílit ho až do rozměrů duchovních, musíme svůj dnešek podřizovat těmto nadějím a o tyto naděje zápasit.



P. Dvořáková předává V. Ludíkové publikaci Objevte esperanto

Na novoročenku pro příští rok, na P. F. 2016 jsem napsala:

Přeji Vám, přeji všem šťastně překročit novoroční práh a obejmout prostor před sebou, který zabydlí duše, ta její část, která miluje, chrání, prosvětluje a tvoří. Objmout, sepnout ruce a vše podstatné předat dál...

Věra Ludíková
fotoj O. A. Fischer

Usnesení náhradního 15. sjezdu Českého esperantského svazu, z.s.,

který se uskutečnil v Ústí nad Orlicí
od 6. do 8. listopadu 2015

Sjezd zvolil:

1. volební komisi pro volby v r. 2016 ve složení: Petr Chrdle (vedoucí), Věra Podhradská, Jana Melichárková,
2. místem příštího sjezdu Pelhřimov (nejlépe v termínu 13.-16.10.2016 nebo 20.-23.10.2016 s hlavním pracovním jednáním od pátku večer) a pověřil výbor zajištěním akce ve spolupráci s místním kroužkem.

Sjezd schválil:

1. zprávu o činnosti ČES za období říjen 2014 až říjen 2015,
2. zprávu o hospodaření za období říjen 2014 až říjen 2015,
3. zprávu dozorčí rady za rok 2014,
4. změnu stanov a zmocnil předsedu (po jazykové korektuře) k zápisu do spolkového rejstříku a k provedení případných změn dle doporučení příslušného Krajského soudu,
5. nový volební řád pro volby r.2016,
6. zorganizování Oficiálního předkongresu UEA ve Svitavách ve dnech 19.-23.7.2016,
7. příspěvkový řád v dosavadní podobě.

Sjezd potvrdil ing. Vladimíra Dvořáka ve funkci předsedy a zároveň statutárního orgánu svazu


Sjezd doporučuje:

1. členům ČES sledovat webové stránky www.esperanto.cz,
2. všem členům ČES propagovat Muzeum esperanta ve Svitavách a podporovat jeho činnost,
3. klubům a sekcím dbát na každoroční aktualizaci svých údajů a dbát na provedení voleb svých orgánů v souladu se stanovami ČES.

Sjezd vyzývá:

1. všechny členy ČES k podpoře Světového kongresu v Nitře v r. 2016,
2. členy k větší aktivitě a vytváření nových pracovních skupin či k zapojení se do již existujících,
3. kluby a sekce k zapojení se do již existujících projektů ČES,
4. zájemce o vedení ČES po r. 2016, aby kontaktovali volební komisi, popř. výbor a postupně se zapojovali do jeho činnosti,
5. všechny členy k přípravě akcí u příležitosti 100. výročí úmrtí dr. Zamenhofa.

V Ústí nad Orlicí 8.11.2015



*Milada Zemanová zve do Pelhřimova,
místa konání příštího sjezdu 2016*

La naŭa ekspozicio en Esperanto-Muzeo en Svitavy:

Kun Esperanto ĉirkaŭ la mondo

aŭ *Alternativaj formoj de vojaĝado kaj ekkonado de fremdaj landoj kaj kulturoj*

La enkonduka panelo *Kiel ekhavi amikojn eksterlande* montras, kiel precipe nova studanto de Esperanto povas akiri personajn kontaktojn, ĉefe pere de interreto kaj sociaj retejoj (komunumo en Lenu.net, Esperanto.com, Ipernity, Facebook, Babilejo.org, Skype-listoj, tute nova servo por korespondemuloj Esperantomondo.net k.a.) kaj rekomendas taŭgajn aranĝojn por komencantoj.



Sekvas skiza prezento de diversspecaj Esperanto-renkontiĝoj, ekde internaciaj kongresoj ĝis kameretosaj aranĝoj por diferencaj celgrupoj, prezento de Pasporta Servo kaj interesaj ekzemploj de individua vojaĝado, kiujn Esperanto peris (P. Polnický en Singapuro, familio Dvořák en Francio, ĈEJ-anoj en Ukrainio, H. Tlachová en Nepalo). Panelo pri *Apliko de Esperanto en turismo* informas i.a. pri esperantligvaj urboretejoj, vikipediaj artikoloj kaj vojaĝfilmoj. Aparta spaco estas dediĉita al vojaĝado kadre de kulturaj projektoj kaj volontulado. La panelojn kompletigas *Kaleidoskopo* kun

kuriozaĵoj kaj *Mondo sur historiaj bildkartoj el esperanta korespondado*. Al la temo *Amikeco sen limoj* fote kontribuis ankaŭ esperantistoj el Francio, Danlando, Meksikio kaj Brazilo.

En la vitrinoj eblas trarigardi elekton de vojaĝrakontoj, gvidlibroj kaj turismaj prospektoj, librojn el la projekto "*Oriento-Okcidento*" kaj vojaĝtemajn kolektmaterialojn. Memstare estas reprezentita la eldonejo KAVA-PECH de P. Chrdle kaj vojaĝtemaj libroj tradukitaj de J. Drahotová el Esperanto al la ĉeĥa.

La intereson sendube kaptos fotoĵoj, korespondaĵoj kaj suveniroj, kiuj montras unikajn internaciajn kontaktojn de esperantistoj. Ekspozicias precipe membroj de Klubo de amikoj de Esperanto Svitavy (i.a. Finnlando, Islando, Ĉinio, Kubo k.a.), K. Janík (Sudafrika respubliko, Vjetnamio, Mez-kaj Sudameriko k.a.) kaj P. Polnický (Usono kaj Sudorienta Azio).

Z. Novotná krom tio prezentas ankaŭ sian kolekton de popolkostumitaj pupoj el la tuta mondo kaj fotoĵojn el vojaĝoj kun infanoj el sia rondeto. La tuton kompletigas atraktivaj vojaĝfotografajoj pri Azio (P. Chrdle kaj P. Polnický), naturfotoĵoj de O. A. Fischer kaj interesaj bildoj el marcipano kreitaj de A. Vyšínková.

La tutjare malfermita muzeo ĝojatendas vian viziton! Kaze ke vi deziras renkontiĝi kun iu el lokaj esperantistoj, bv. ĝustatempe antaŭanonci vin (svitavy@esperanto.cz. aŭ tel. 604 377 616). La urbo Svitavy kaj la ĉirkaŭaĵo ofertas krome multon interesan por via ekskurso! Pliajn informojn pri la ekspozicio, inkl. fotogalerion, kaj multon plian pri la muzeo mem vi trovos en www.muzeum.esperanto.cz.

Programo de la inaŭguro de la ekspozicio

la 26-an de septembro 2015

La gastojn bonvenigis Libuše Dvořáková kaj koncepton pri la ekspozicio klarigis ekspoziciestro Pavla Dvořáková. Krom prezentiĝo de ekspoziciantoj P. Polnický kaj P. Chrdle la partoprenantoj povis aŭskulti nekredoblan vivhistorion de blinda vojaĝanto kaj Esperanto-verkisto kaj instruisto V. Erošenko (legitan de M. Turková) kaj spekti publikan premieron de la Esperante dublita filmo pri Svitavy kaj televidan intervjuon kun grupo de francaj esperantistoj vojaĝanta tra Ĉeĥio (vidu Starton 2015/3).



La ŝatata programero estis sendube ankaŭ refreŝiĝo preparita de la membrinoj de la loka klubo. Al la muzika programo ĉi-foje kontribuis geedzoj Jelínek el Jilemnice, membroj de Sekcio de nevidantoj de ĈEA. Jiří Jelínek malfermis ankaŭ posttagmezan prelegan blokon *Turismo per ĉiuj sensoj*, nome per tre interesa fotoprezento de palpekspozicioj, precipe en Ancona (Italio), Olomouc kaj Vieno. Libuše Dvořáková konatigis kun aktivecoj de Klubo de ĉeĥaj turistoj kaj ĝia projekto

Ekoturismo por ĉiuj, kaj kun novaj senbarieraj itineroj en la regiono Pardubice (arbaro Brand kaj Akvorezervuja arbaro apud Svitavy kaj belvida turo Bára apud Chrudim). Pavla Dvořáková konatigis kun palpekspozicioj (Muzeo Pardubice) kaj palpopadoj (vidu la nudpiedan retejon www.bosaturistika.cz) kaj ĝardenoj de sensoj en Ĉeĥio (ekz. en Olomouc, Rudka ĉe Kunštát, altlernejo JABOK en Prago k.a.). Resumo en la ĉeĥa lingvo estas preparata por diskonigo en la ĈEA-retejo. Sekve Petr Chrdle projekciante atentokapte komentariis siajn impresojn pri 7 elektitaj (el sepdeko da vizititaj) landoj de la mondo.

La vespero komenciĝis per prezento de J. Drahotová pri siaj ĉeĥlingvaj librotradukoj el Esperanto (multaj el ili elŝuteblaj en

<http://www.mlboleslav.cz/esperanto/>).

Sekvis renesancaj kantoj en prezento de geedzoj Jelínek kaj fine ne mankis komuna kantado kun gitaroj, kiun ludis ankaŭ nova vizitanto d-ro Tomáš Matějček el Lysá n.L.

Pavla Dvořáková

La aranĝo realiĝis kun financa subteno de la Regiono Pardubice.



La 3-a Sud-Azia Seminario en Katunayake - Srilanko 31.10. - 4.11. 2015

Srilanko - verda insulo banata de la Hinda oceano troviĝas proksime al la suda parto de Barato. Subtropika vetero favoras kreskadon de vegetaraĵoj kaj diversspecaj palmoj. Ĉarmas belaj plaĝoj kaj fortaj ondoj, kiujn ĝissate ĝuis Nepalanoj.



Nepalaj esperantistoj de NEspA sub la gvido de Bharat Gimire, la ĉef-organizanto en kunlaboro kun unusola esperantisto en Srilanko s-ro Zeiter Perera kaj kun helpo de Pradip Gimire kaj Hori Jasuo sukcese organizis la 3-an SAS en proksimeco de la urbo Kolombo. KAEM subtenis la aranĝon finance.

La seminaria temo estis:

“Interkultura kompreniĝo”.

Komencaj necertecoj pri la sukceso estis rapide anstataŭataj per entuziasmo kaj ĝojo ĉe alveno al Srilanko. La eventon partoprenis dudek unu esperantistoj el Nepalo, kvin el Barato, unu el Pakistano, unu el Japanio, unu el Srilanko kaj du el Francio, kiuj estis la solaj esperantistoj el Eŭropo.

La programo komenciĝis sabate posttagmeze la 31-an de oktobro 2015 per registrado de la partoprenantoj.



Ekfunciis ankaŭ malgranda libroservo. Poste okazis unua komitata kunsido kaj samtempe Hori Jasuo instruis la E-himnon, montris kaj sonigis diversajn muzikilojn. Dum la interkona vespero prezentiĝis ĉiuj partoprenantoj kaj vigle interbabilis pri diversaj temoj kaj pri siaj ŝatataj hobiaj.

Dimanĉe okazis la malfermo de la seminario. Bonvenigis nin s-roj Bharat Gimire kaj Zeiter Perera.

Honora gasto Hori Jasuo en ĉeesto de aliaj komitatanoj lumigis tri kandelojn simbole al la 3-a SAS.

Poste estis legataj salutmesaĝoj de UEA, KAEM, ILEI. Sekvis salutoj de reprezentantoj el diversaj landoj. Liba salutis nome de ĉiuj ĉefaj esperantistoj kaj Floreal nome de la francaj. Por komencantoj kaj progresintoj okazis E-kurso. Hori Jasuo parolis pri Esperanto-Sumoo. Post la tagmanĝo, en la prelego de Chohnath Pokhrel, ni ekkonis la nepalan kulturon. Diversregionaj popol-dancoj estis montritaj sur televid-ekrano. Pri la Esperanto-movado en Barato raportis sinjoroj Reddy, Siva kaj Giri.

Vespere ni spektis buntan dancprogramon de nepalaj samideanoj. Belege vestitaj virinoj en naciaj kostumoj prezentis serion de dancoj kaj kantis nepale. Ili informis pri baldaŭa festo de la Lumo – *Divali* kaj estis lumigitaj pluraj kandeloj. Tre bela kaj gaja etoso daŭris ĝis la noktomezo.

La belecon de la verda insulo ni admiris sekvan tagon dum la tuttaga ekskurso. Survoje al la urbo *Kandy*, kiu troviĝas 116 km for de Kolombo ni unue haltis en herbo-ĝardeno, kie oni klarigis al ni la utilecon de diversaj unuopaj herboplantoj. Eblis aĉeti produktojn kontraŭ diversaj doloroj kaj malsanoj.

En la urbo *Kandy* ni vizitis la templon *Dala da Maligawa*, (Templo de la Dento). Pro malboniĝinta pluvega vetero ni ne povis viziti la faman botanikan ĝardenon *Peradeniya*. Survoje al la urbo *Nuwara Eliya* (urbo de la Lumo) troviĝas pluraj akvofaloj. La urbo situas en alteco de 1900 metroj meze de teoplantejoj.

En *Ramboda* ni haltis kaj vizitis la teofabrikon *Blue Field* kun klarigoj pri diversaj teoj (nigra, verda, blanka) kaj vidis la procedon de iliaj fabrikadoj. En Srilanko oni ĝis nun rikoltas la teofoliojn permane. Laŭdire srilankaj teoj estas la plej bonaj en la mondo.

Marde okazis denove Esperanto-kursoj kaj la dua komitata kunsido en kiu oni decidis starigi fonduson por Sud-Azio. S-ro Saeed el Pakistano prelegis pri islamismo kaj sufismo. Diskuton pri la seminario gvidis s-ro Giri el Barato. Ni ankaŭ eksciis pri srilanka kaj nepala movadoj kaj ricevis informojn rilate al Esperanto pri aliaj sudaziaj landoj. Kun Bharat la partoprenantoj lernis kelkajn E-kantojn.

Posttagmeze Hori Jasuo prezentis kaligrafion kaj ni skribis la vorton amikeco en diversaj lingvoj. Geedzoj Liba kaj Floreal Gabalda prezentis filmon pri la lastjara Unua Speciala Renkontiĝo en Nepalo. Vespere ni okazigis bankedon kaj bingo-ludon lerte prezentitan de nia japana samideano Hori Jasuo.



Li ankaŭ provizis valorajn premiojn por ĉiuj. Je la fino ni aŭskultis kelkajn kantojn kaj dancis en akompano de tamburo ludata de Bharat ĝis malfruaj horoj.

La 4-an de novembro matene okazis fermo. Oni resumis la disvolviĝon de la seminario kaj konstatis, ke ĝi bone sukcesis malgraŭ komencaj duboj kaj malfacilaĵoj pri la organizado.

Bedaŭrinde pro manko de loka kontakto ne povis okazi la planita lingva festivalo kaj prelegoj en publikaj lokoj. Ĉiuj partoprenantoj estis kontentaj, bone amuziĝis kaj pasigis agrablajn tagojn en Srilanko. Posttagmeze ni revizitis la urbon Kolombo kaj vespere ni jam forflugis al Barato, kie postsekvis la trajn-aventuroj.

Koran dankon al la organizantoj de la 3-a SAS, kiuj multe ŝvitis por bona sukceso de la seminario. La venonta SAS estos planita en Barato.

Liba Gabalda
fotoj Floreal Gabalda


Novajoj el la eldonejo KAVA-PECH

Aperis en Bulteno de EK Prago 2015/2

En la jaro 2015 – kaj tion mi bedaŭras – mia eldonejo KAVA-PECH eldonis nenium beletraĵon. Ne pro tio, ke mankas manuskriptoj. Kio mankas, estas la mono por eldoni ilin. Kaj bedaŭrinde la aĉetemo de esperantistoj ĉiujare mal-kreskas. Tamen mi durkape kaj obstine pretas plu eldonadi ankaŭ librojn en Esperanto, kvankam malpli ofte ol antaŭe.

Jam antaŭ la Universala kongreso en Lille mi sukcesis eldoni du fakajn librojn, kiuj certe valoras atenton. Unue, la sepan numeron en la vico de almanahoj *Esperantologio / Esperanto Studies*. Ĝi estas eldonata kunlabore kun la Universitato de la sveda Gotenburgo sub la redaktado de la prezidanto de la Akademio de Esperanto, profesoro Christer Kiselman. Sur 126 paĝoj en-estas ĉi-foje ses studoj de elstaraj interlingvistoj, kvar el ili en Esperanto (Věra Barandovská-Frank, Bernd Krause, Wim Jansen kaj Christer Kiselman).


La dua eldonaĵo, *UEA en konscio de esperantistoj*, estas serioza sociologia studo de du renomaj sociologoj, profesoroj Zbigniew Galor el Pollando (Universitato de Szczecin) kaj Yukka Pietiläinen el Finnlando (Universitato de Helsinki). El la recenzo de Michel Duc Goninaz mi citu: Antaŭ ĉirkaŭ 40 jaroj sociologoj komencis prezenti al la esperantistoj spegulon, en kiu ili eble legos la respondon al la demando „kiu ni estas?“.



Ĉi tiu libro estas nova kaj grava paŝo en la sociologia esplorado de tiu malfacile difinebla fenomeno, ĝenerale konata sub la nomo Esperanto-Movado.


Antaŭ la fino de la jaro, aŭ tuj komence de 2016, aperos du gravaj libroj ankaŭ litigitaj al Esperanto, kvankam en la ĉeĥa.

Robinsoni na Sibiri estas memuaro de Tivadar Soros, altirige priskribinta la fuĝon



de la aŭtoro kun kelkaj aliaj malliberuloj el la kaptitejo en Siberio post la unua mondmilito kaj ilia suferplena vojo tra la siberia praarbaro – la tajgo. El la Esperanto-originalo *Modernaj robinsonoj* ĝin tradukis Jindřiška Drahotová, la antaŭparolojn de la filoj de la aŭtoro kaj la riĉajn rimarkojn de la editoro Humphrey Tonkin el la angla eldono tradukis Marek Blahuš. Laŭ la deziro de la kopirajtposedanto George Soros la libro estas kompletigita per hinda fabelo, ankaŭ el la plumo de Tivadar Soros. La libron bele ilustris Miroslava Tomečková.

Alia libro planata por eldoni ankoraŭ en la jaro 2015 estas la lernolibro *Esperanto od A do Z*, kiun mi origine planis eldoni kiel la 4an eldonon de *Esperantem za tři měsíce*. Sed mi



akceptis la riproĉojn de pluraj flankoj (precipe kiam mi mem komencis uzadi ĝin dum instruado de Esperanto), ke la titolo estas trompa, ĉar nur lingva geniulo povas vere bone ellerni ĉion, kion ĝi enhavas, dum tri monatoj. Fakte mi devas konfesi, ke tio estis malfacila, eĉ kiam aperis la unua eldono, sed kiel oni

povas legi enkonduke, ne ni aŭtoroj kulpas pri tio. La nomo de la kurso estis difinita de la redaktoro de Český expres, la (ne plu ekzistanta) gazeto, kiu mendis ĝin de ni. Temis pri daŭrigo de la vico de samnomaj kursoj *Anglicky (Německy, Italsky, ...)* za tři měsíce. Ankaŭ la strukturo de la lecionoj, de lundo ĝis ĵaŭdo ĉiutage nova leciono, ĉiam vendrede ripetiga leciono, estis firme difinitaj de la redaktoro.

Ni kaptis la ŝancon, ke male ol ĉe la naciaj lingvoj, kie tri monatoj sufiĉas nur por iom gustumi la lingvon, ĉe Esperanto oni povas akiri pli: klarigi la kompletan gramatikon kaj doni eĉ sufiĉan vortprovizon por povi kontentige ekuzadi la lingvon. Tamen, post la plimultnombrigo de la vortprovizo ĉe ĉiu nova eldono kaj post aldono de legolibro kaj pluraj aliaj aldonaĵoj, la titolo estis des pli misgvida. Tial mi decidiĝis ŝanĝi la titolon. Sed, ĉar la strukturo kaj la bazo de la gramatikaĵoj kaj eĉ la baza vortprovizo restas, mi klarigas enkonduke, ke temas pri la kompletigo de *Esperantem za tři měsíce*. Tial ankaŭ prave mia edzino Stanjo restas kunaŭtoro, malgraŭ tio, ke ŝi mortis 16 jarojn antaŭ ĝia apero.

Kiam mi preparis tiun ĉi lernolibron, mi planis dekomence aldoni al ĝi kompaktdiskon (KD) kun ekzercoj, kun ĉiuj Esperanto-tekstoj de la lernolibro modele tralegitaj kaj pluraj specimenoj de la esperantlingva kulturo. Feliĉe, mia slovaka kolego kaj amiko Petro Baláž (al kiu mi donis la kopirajton, ĉar li, mem aŭtodidakta lerninto de Esperanto per nia lernolibro, planas eldoni ĝin paralele ankaŭ en la slovaka) konvinkis min, ke KD estas jam eksmoda, ĉar preskaŭ ĉiuj junuloj ne plu disponas per ĝiaj legiloj. Por ne superflue kostigi la libron pro la

aldonita kaj ne por ĉiuj uzebla KD mi do decidiĝis, same kiel Petro Baláž, enmeti la enhavon de la preparata KD senpage al la interreto.

Tamen, ĉar mi supozas, ke estas ne nur mi sola, kiu preferas lerni *off line*, do nekonektita al la reto, mi eldonos ankaŭ la KD kun la sama enhavo, tamen kiel memstaran eldonaĵon *Procvičuj si esperanto*, uzeblan ankaŭ memstare. La avantaĝo estos, ke ĝin povos aĉeti ankaŭ la posedantoj de la lernolibro *Esperantem za tři měsíce*, sen devi aĉeti la novan libron, kaj eblos ĝin ankaŭ uzi tute sen ajna ligo al iu lernolibro. Kaj male ol la datenoj en la reto, ne estas danĝero de malapero.

Mi volas ĉi tie uzi la okazon por danki al miaj kunlaborantoj, kiuj multe helpis al mi dum la preparo: precipe al Katarína Novotníčková (parenteze: tradukantino de la libro en la slovakon), kiu transprenis la teknikan flankon de la ekzercoj kaj de la KD-aranĝo samtempe uzebla por la reto, al Josef Vojáček por la propono de la ekzercoj, al Zdeněk Pluhař por la propono de la kvizoj por la ripetigaj lecionoj ĝis 40 kaj por la konversaciaj lecionoj 41 ĝis 60, al Vladimír Türk por la registrado kaj prilaboro de ĉiuj aŭdiosieroj, al Pavel Rak por liaj ĉarmaj ilustraĵoj, kaj al pluraj provlegantoj, kiuj sendis al mi multajn instigajn rimarkojn, el inter kiuj mi nomu almenaŭ tiujn el nia praga klubo: Jindřich Košťálek, Petr Minovský kaj Margit Turková. (Al ili, kaj al ĉiuj ceteraj, estas esprimita mia danko en la lernolibro.)

Sed mi ankaŭ volas publike peti ilian pardonon, ke mi ne akceptis ĉiujn iliajn proponojn kaj tial peti la legintojn de la lernolibro kaj la uzantojn de la KD pri

sekva konsidero: Kion vi trovos bona en ambaŭ verkoj, pri tio meritas la tuta kolektivo, sed kion vi trovos malbona, konfuziga aŭ eĉ erara, pri tio kulpas mi sola. Kaj mi tre volonte akceptos rimarkojn de uzantoj, kiujn mi povus utiligi ĉe sekvaj eldonoj de la verkoj.

Per la eldono de tiu ĉi lernolibro kaj KD mi kompletigas la sistemon de lerniloj eldonitaj de KAVA-PECH:

Esperanto pro děti / Esperanto por infanoj, volumoj 1 kaj 2, verkitaj de Jana Melichárková kun lernigaj ilustraĵoj de Miroslava Tomečková,

Esperanto přímou metodou de Stano Marček, en traduko de Max Kašparů kaj kun ilustraĵoj de Linda Marčeková. Ĝi estas bona enkonduka lernolibro precipe por tiuj, kiuj krom la ĉeĥa ne scipovas bone alian fremdan lingvon. Ĝia avantaĝo estas, ke ĝi aperis jam en pli ol 30 lingvaj versioj, do la komencanto, kiu renkontiĝos kun eksterlandano uzanta la saman lernolibron, havas kun ŝi aŭ li la saman vortprovizon. Ĝi estas ankaŭ uzata ĉe la korespondaj kursoj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

Esperanto od A do Z, kiu estas bona por plustudado post la finiĝo de tiu antaŭe menciita, aŭ kiel la unua por tiuj, kiuj jam scipovas iun fremdan lingvon, orientiĝas en ĝenerala gramatiko kaj komprenas, ke necesas tradukadi la sencon kaj ne la unuopajn vortojn.

Bonvenon en nia mondo, legolibro kaj samtempe lernolibro pri la Esperantomovado en la mondo, verkita de Bent Jensenius, komence en tre simpla Esperanto. Ĉiu el la 27 ĉapitroj konsistas el tri partoj: teksto, dialogo, demandoj.

Ilustrita frazeologio de Sabine Fiedler kaj Pavel Rak, amuza, sed efike instrua verko, kiu devus manki en la librobreto

de neniu progresinta lernanto de Esperanto.

Kantoj por ĝojo kompilita de Stanjo (Stanislava Chrdlová), kolekto de la plej famaj, plejparte popolaj, kantoj el pluraj landoj, enhavanta krom la tekstoj ankaŭ muziknotojn kaj gitaro-akordojn.

Por la venonta jaro mi planas eldoni en Esperanto minimume du beletraĵojn, ambaŭ tradukoj el la germana: ***Heredantoj de silentado*** de Sabine Dittrich, romano sur la fono de la komplikaj germanaj-ĉeĥaj rilatoj post la dua mondmilito (el la germana originalo tradukis Henryk Wenzel), kaj ***Milit-impresoj***, memuaron de Martin Stuppnig pri siaj travivaĵoj en la vicoj de *Wehrmacht* (la germana armeo) dum la dua mondmilito kaj kiel kaptito en Egiptio (el la germana originalo tradukas József Horváth).

Estas ankaŭ aliaj eldonplanoj rilate al la Esperanto-literaturo, sed ne sciante, ĉu mi sukcesos ilin realigi en 2016 mi prefere ankoraŭ ne publikigas ilin.

Ĉar esperantistoj ja interesiĝas ankaŭ pri ĉeĥaj libroj, mi aldonu, ke momente inter la ĉi-jaraj eldonaĵoj de KAVA-PECH furoras la romano *Za dveřmi školy*. Ĝi priskribas la komplikan situacion en la lernejoj, kiujn vizitadas lernantoj el neadaptiĝemaj familioj. La realan fonon garantias la juna verkistino kaj instruistino Markéta Vignerová, kiu en tiuspeca lernejo instruis 7 jarojn kaj dume kaptadis materialon por la verko.

Mi volas ĉi tie uzi la okazon por danki al miaj kunlaborantoj, kiuj multe helpis al mi dum la preparo: precipe al Katarína Novotníčková (parenteze: tradukantino de la libro en la slovakon), kiu transpenis la teknikan flankon de la ekzercoj kaj de la KD-aranĝo samtempe

uzebla por la reto, al Josef Vojáček por la propono de la ekzercoj, al Zdeněk Pluhař por la propono de la kvizoj por la ripetigaj lecionoj ĝis 40 kaj por la konversaciaj lecionoj 41 ĝis 60, al Vladimír Türk por la registrado kaj prilaboro de ĉiuj aŭdiosieroj, al Pavel Rak por liaj ĉarmaj ilustraĵoj, kaj al pluraj provlegantoj, kiuj sendis al mi multajn instigajn rimarkojn, el inter kiuj mi nomu precipe Jindřich Košťálek, Jana Melichárková, Petr Miňovský, Karel Votoček, Mirka Tomečková kaj Margit Turková. Al ĉiuj mi ĉi tie esprimas publikan dankon.

Petro Chrdle,
chrdle@kava-pech.cz

Informace o UK 2016 v Nitře 23.-30 7. 2016

Zájemci, vyžádejte si přihlášku a „unuan bultenon“, pošlu okamžitě, jakmile dorazí z UEA (podle informace jsou už na cestě). **Kongresový poplatek je možno platit na účet ČES pouze do 22.12.2015**, aby byla jistota, že se stačí nahlásit do UEA do 31.12. (konec první periody). Poplatky do tohoto data jsou pro nás (Kat. B):

1. Přímý člen UEA (neplatí pro kat. MG): 135 EUR
2. Ne přímý člen UEA: 170 EUR
3. Člen výboru UEA, mládežník*, invalida** (s průkazem), pokud je přímý člen UEA: 65 EUR
4. Společník***, mládežník, invalida, ne přímý člen UEA 100 EUR

* Mládežník: Narozený mezi 1.1.1985 a 31.12. 1994 (stejně pro mládežnice)

** Invalida: Ten, jehož účast nutně předpokládá doprovod (např. nevidomý)

*** Společník: kdo bydlí na stejné adrese s přihlášeným ad 1, ev. ad 2.

Bezplatně se přihlašují narození po 31. 12. 1995 a nezbytný doprovod přihlášeného invalidy.

UPOZORNĚNÍ: Platba ve prospěch UEA v Kč (jak členství, tak i platby pro UK) prostřednictvím ČES je služba členům. Proto ji ČES poskytuje pouze svým členům. Aktivní esperantisté-nečlenové mohou tuto výhodu případně získat na základě žádosti, kterou do týdne posoudí a rozhodne výbor ČES.

Vzhledem k rizikům pohybu kurzu CZK/EUR nejsou uváděné částky v Kč pro UK. Důvodem je, že ČES si nemůže neaktuálním kurzem CZK/EUR dovolit dotovat např. platby za objednané ubytování během UK. Aktuální kurz, v kterém budete platit na účet svazu si spočtete tak, že sumu v EUR vynásobíte aktuálním kurzem (ČSOB deviza prodej) + 0,1 Kč podle

<http://www.csob.cz/cz/Csob/Kurzovni-listky/Stranky/kurzovni-listek.aspx>.

V případě nejasnosti kontaktujte mne nebo pokladníka V. Hirše a my Vám sdělíme aktuální kurz a tedy cenu v Kč.

Další užitečné odkazy ohledně UK najdete na www.esperanto.cz/UK.

Srdečně vás zdravím a přeji veselé vánoční a novoroční svátky.

Petr Chrdle

Dobřichovice, 736 645 455,
chrdle@kava-pech.cz

Informace hlavního delegáta UEA pro ČR

Blíží se konec roku 2015 a většina přímých členů UEA má uhrazené členství, někteří již platili i na rok 2016. Pokud jste členové ČES a učinili jste tak prostřednictvím Českého esperantského svazu, není potřeba mi to sdělovat, vždy jakmile dostanu sdělení od pokladníka Vratislava Hirše o platbě, odešlu o tom hlášení (Spezofolio) do UEA. Ti z vás, kteří neobnovili členství v r. 2015 a nechcete mít svoje členství přerušeno, vězte, že je možno si ho stále uhradit, např. společně s rokem 2016. Stačí kategorie MG a Vaše členství nebude přerušeno.

Výše členského příspěvku pro rok 2016 se nemění, zde ho připomínám:

Kategorio MG (membro kun Gvidlibro, atentu, ke tiu ĉi-jare krom ricevo de la unua parto de Jarlibro – sen la listo de delegitoj, rajtas ankaŭ eniri la retan revuon Esperanto) **Kč 190,-**

Kategorio MJ (membro kun Jarlibro: ricevas kompletan Jarlibron, havas rabatojn aliĝante al UK kaj aĉetante librojn de la UEA-libroservo, rajtas legi la revuon Esperanto rete) **Kč 480,-**

Kategorio MA (Membro-abonanto: krom ĉio kiel la kategorio MJ ricevas revuon Esperanto en klasika papera formo) **Kč 1200,-**

Kotizo por Societo Zamenhof (Kategorio SZ, mecenato de UEA), la kotizon oni pagu aldone al sia kategorio de membreco **Kč 2400,-**

Patrono de TEJO (Kategorio PT, mecenato de TEJO) ne inkluzivas membrecon. PT ricevas la junularan revuon Kontakto kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO) **Kč 460,-**

Přímí členové UEA kat. MJ a MA do 29 let včetně dostávají navíc oficiální orgán TEJO „Kontakto“.

NEPŘEHLÉDNĚTE číslo účtu ČES (platí již od 1.1.2012, ale raději připomínám)!!!

Svazu plaťte poštovní poukázkou A nebo převodem na účet **2800186228/2010, variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na obálce při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (**06941 pro přímé členství v UEA, 06944 pro poplatek UK**).

Pokud platíte v jedné sumě i jiné platby svazu, informujte o tom (s rozpisem co, ev. za koho současně platíte) Vratislava Hirše (kontakty viz tiráž Starta).

Těm z vás, kteří jsou delegáty, ev. odbornými delegáty UEA, děkuji za tuto službu, která jistě není nijak náročná, ale jste článkem velice důležité sítě esperantistů ochotných nezištně pomoci samideánům. Jen připomínám, že není povinností delegáta ani ubytovávat esperantisty (k tomu slouží síť Pasporta servo), ani přijmout jakoukoliv prosbu zahraničního esperantisty, která by vyžadovala vaše finanční výdaje nebo příliš vašeho času. V tom případě máte právo takovou žádost odmítnout, eventuálně žadatele upozornit, že vyhovíte, pokud Vám nahradí výdaje s tím spojené, které dohromady činí xy EUR. A současně se obracím na ty, kteří delegáty nejsou, aby uvážili zapojení se do této unikátní sítě.

Petr Chrdle
Dobřichovice, 736 645 455,
chrdle@kava-pech.cz

Vizitantoj el Ĉinio

Inter la 29-a de septembro kaj la 1-a de oktobro 2015 Klubo de Esperanto-Amikoj en Svitavy gastigis du ĉinajn esperantistinojn, Wu Hanping kaj Wu Liu el regiono Kantono en Ĉinio. La esperantistinojn motivis por la vizito de Svitavy filmo, per kiu la klubo prezentis sin enkadre de film-konkurso proklamita de Ĉina Radio Internacia en Pekino. La konkursa film-festivalo estis parto de foiro pri teo en la urbo Hangzhou. La sama motivo venigis al Svitavy unu monaton pli frue program-gvidanton de la festivalo, redaktorinon Ĝoja.



Ĉe la urbestro

Marde la 29-an de septembro Pavol Kaščák kun Rostislav Čubok el Bartošovice projekciis filmon pri sia restado en Ĉinio. Pavol gajnis en la konkurso la 1-an premion kaj estis invitita al la festivalo. Merkrede niaj gastoj renkontiĝis en la urbodomo kun la sinjoro urbestro. La renkontiĝo estis tre kora. Saliko (esperanta nomo por Wu Liu) invitis la sinjoron urbestron por te-ceremonio, kiu vespere realiĝis en la Esperanto-muzeo. La spektantoj povis

vidi kelkcentjaran ceremonion de te-preparado, kiu estis forgesita kaj nun en lastaj ses jaroj ĝi revenas kaj estas universitate instruata. Nur malmultaj scias, ke teon eblas batkirli kaj pentri ĝian ŝaŭmon. Ne mankis te-gustumado kaj diskutado pri la vivo en Ĉinio. Por pli rapida komunikado kun la ĉinaj gastoj tradukis el la ĉina en la ĉeĥan s-ino Li, kiu vivas en Svitavy pli ol 10 jarojn. Harpina (propranome Wu Hanping) koncize prezentis sian urbon kaj fine ŝi rekompencis la plej atentajn aŭskultantojn per premioj en formo de dolĉaĵoj, kiuj estas bakataj en ilia hejmo en la festotagoj. Antaŭ la fermo de la renkonto Saliko kantis ĉinan popolan kanton, kiu nuancigis la orientan etoson. Saliko donacis al nia muzeo paperon produktitan per malnova manlabora metodo kun enpremitaj arbofolioj kaj kolekton de kolorigitaj folioj el ĉina arbo. Harpina kompletigis nian kolekton de ĉinaj esperantlingvaj libroj.



Ĵaŭde Libuše Dvořáková kaj Dagmar Martínková akompanis Harpinan kaj Salikon al la kastelo Bartošovice, kie okazis kvartaga lernejo de Esperanto. Partoprenis ĝin 36 esperantistoj el 4 landoj.

Esperanton por komencantoj instruis Stano Marček, prezidanto de la Slovacia Esperanto-Federacio kaj aŭtoro de rektmetoda lernolibro de Esperanto, kiun li jam eldonis en 36 lingvoj. Ĉeestis ankaŭ prezidanto de la Pola Esperanto-Asocio s-ro Mandrak. Ni vizitis lokan muelejon, kie funkcias du elektrejoj. Poste Domon de la Naturo por savi rabobirdojn kaj ankaŭ aliajn libere vivantajn bestojn.



Riĉa estis ankaŭ kultura programo. Saliko denove prezentis ceremonion pri preparado de la vera ĉina teo, kantis hungara esperantistino Anjo (ŝi kantis ankaŭ dum UK en la franca Lilo).



Ni aŭskultis esperantlingvan koncerton de la grupo *No problem* el Kostelec en la Haná-regiono, kiu prezentos sin ankaŭ en la venonta UK Nitra.



Inter nin venis ankaŭ televido Polar el Ostrava, kiu elsendis mallongan informon pri Bartošovice.



La etoso estis amika kaj bonkora. Tial la partoprenantoj ĉiujare revenas. Venu amuziĝi kun ni!



Libuše Dvořáková

Rimarko: Pri la Esperanto-lernejo en Bartošovice informis ankaŭ la loka versio de la gazeto **5 plus 2** (Novojičínsko) la 9-an de oktobro 2015 sur la titolpaĝo per artikolo *Do Bartošovic se sjeli esperantisté až z Číny* (Al Bartošovice alveturis esperantistoj eĉ el Ĉinio). <http://www.5plus2.cz/?e=JF-NJICIN&d=09.10.2015>

ĜENERALA KONFERENCO DE UNESKO FINIĜIS ZAMENHOF OMAĜOTA

La 38-a Ĝenerala Konferenco de Unesko finiĝis la 18-an de novembro 2015 post dusemajna laboro en la sidejo de la monda organizaĵo en Parizo. Kiel ruĝa fadeno tra ĝiaj diskutoj iris la 70-jariĝo de Unesko kaj la realigo de la Celaro 2030 por Daŭripova Evoluigo, sed en sia ferma parolado la Ĝenerala Direktoro s-ino Irina Bokova ne povis ne tuŝi la lastatempajn terorismajn atakojn, interalie meze de la konferenca periodo en Parizo mem: "Tiu ĉi krima perfortaĵo trafas nin ĉiujn. Ĝi atakas ĉion, kio estas plej kara al ni: libereco, homaj rajtoj, la digno de ĉiu homo, nia sento de aparteno al la unusama homaro."

Por esperantistoj la plej ĝojiga decido de la Ĝenerala Konferenco estas la envicigo de la 100-a datreveno de la morto de L.L. Zamenhof (14-a de aprilo 2017) inter 53 datrevenoj kun kiuj Unesko estos "asociita" en la periodo 2016-2017. Propono pri tio estis farita de Pollando, kun subteno de Germanio kaj Slovakio. Temas pri plia rekono de Unesko al Zamenhof post tiu okazo de la 100-a datreveno de lia naskiĝo, kiam li estis proklamita unu el la grandaj personecoj de la homaro.

Universala Esperanto-Asocio, kiu havas oficialan statuson ĉe Unesko ekde 1954, estis reprezentita de kvar observantoj: Renée Triolle, François Lo Jacomo, Oleksandra Kovyazina kaj Nathalie So Yun Kesler. Hazarde samtage, la 5-an de novembro, kiam estis akceptita la aŭspiciado de la Zamenhof-datreveno, UEA havis tempon ĉe la budo por ne-registaraj organizaĵoj, ĉe kiu la UEA-representantoj povis disdoni informilojn kaj respondi demandojn pri Esperanto kaj la agado de UEA.

TEMO DE LA 101-A UK:

"SOCIA JUSTECO — LINGVA JUSTECO"
Laŭ la decido de la Estraro de UEA, la temo de la 101-a UK en Nitro (23-30 julio 2016) estos "Socia justeco — lingva justeco".

SERĈATA: NOVA REDAKTORO DE "ESPERANTO"

Laŭ interkonsento kun la Estraro de UEA, la nuna redaktoro de "Esperanto", Fabrício Valle, finos sian laboron en tiu posteno per la aprila numero de la jarkolekto 2016.

Tial UEA nun invitas kandidatiĝojn por transpreni la redaktadon de la revuo ekde numero 2016:5. Tio signifas eklabori jam komence de aprilo 2016. La sukcesa kandidato ricevos kontrakton por finredakti la jarkolekton 2016; decido pri renovigo/plilongigo estos farita en oktobro 2016. La redaktan laboron la redaktoro faros ĉefe en sia loĝloko. Tamen, estus avantaĝo se la sukcesa kandidato povus pasigi parton de aprilo en la Centra Oficejo por pli funde konatiĝi kun la atendoj kaj informfluo ligitaj al tiu laboro.

Kandidatoj devas havi tre bonan lingvan nivelon (KER-nivelo C1), ĵurnalisman aŭ redaktan sperton, pruvitan kapablon por memstara laboro kaj bonan konon de la Esperanto-movado. La Estraro serĉas personon, kiu aktive kontribuos al la efektivigo de la Strategia Laborplano de UEA, kiu estas iniciatema kaj kreema, kaj kiu interesiĝas pri plej diversaj aspektoj de la movado.

HELPO DE BIBLIOTEKA APOGO BACHRICH AL OK BIBLIOTEKOJ

Subvencion ricevis Biblioteko Carlos Domingues de Brazila Esperanto-Ligo (€ 180), Bulgara Esperanto-Asocio (€ 191), Esperanto-biblioteko en Rumonge (Burundo; € 377), Biblioteko de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Svitavy (€ 133), Filipina Esperanto-Junularo (€ 157), Dokumenta Esperanto-Centro (Kroatio; € 145), Esperanto Nicaragua (€ 158) kaj Biblioteko de "La Ondo de Esperanto" (Rusio; € 156).

Laŭ Gazetaraj Komunikoj de UEA

Libroj de Apogo Bachrich

kiujn ricevis nia muzea biblioteko:

Interlingvo inter lingvoj, Pajleroj kaj stoploj, Vivprotokoloj, Ok jaroj ĉirkaŭ la mondo, Imperiaj ambicioj, La legisto, Danĝeraj rilatoj, Planlingvaj bibliotekoj, Pioniroj de la IL, Esperantologio kaj la Interreto.

Ekbrilu stelo Betlehema

De temp' Kristnaska jam proksima
kristarba spiras bonodor'
kaj ĝia mola voĉ' intima
pri hejm' rakontas al la kor'.

Denove la anim' pleniĝas
per varm' de hejma vigili',
kaj rememori ne sufiĉas,
karajn apudi hastas mi.

Kandelojn de l' kristarb' ekbrilas
post la Kristnask-festena karp'
kaj kortuŝite ni humilas
antaŭ donacoj sub la arb',

kantante pri l' naskiĝo Krista,
Savanto, kiun sendis Di',
pri povra stal' kaj ar' paŝtista,
pri l' ĝojo, kiun sentas ni.

Ni rememoras malfeliĉajn,
kaj ĉiujn, kiujn baras fat',
igante ilin tre malriĉaj
per la disigo de l' amat'.

Ni petos en ĉi nokto sankta
por la homaro pri donac',
al homa gento misvojanta,
ke stel' vojmontru al la pac'.

Al la kompren' kaj toleremo
la vojon montras nia stel',
de glora stel' de Betlehemo
la am' kaj bono estas cel'.

Jiří Kořínek
1952-12-21

Adam Michna z Otradovic

(1600-1676)



KANTIS PATRINO AL FILET'

(Chtíc aby spal)

esperantigis Pavla Dvořáková



Kantis patrino al filet'
plej amata,
dormo alvenu al knabet'
adorata.
Songŭ, ho rava infanet',
Dia filo,
songŭ kviete, rozflore't',
en lunbrilo.

Por vi dormlokon sternis mi,
ho Savanto,
ĉiujn alvokis laŭdi vin,
Mondkreanto.
Dormu plej dolĉe, en trankvil',
Jesueto,
gardos mi songon vian ĉe
la kripeto.

Vivjubleoj

En tiu ĉi jarsezono solenis aŭ solenas sian (duon)rondan naskiĝtagon jenaj membroj. Elkoran gratulon kaj multan sanon!

Václav Pospíšil, Semily
Rita Naumová, Hradec Králové
Ludmila Srbová, Pardubice
Zdeněk, Heiser, Havířov
Kateřina Hosová, Havířov
Jaroslav Špůr, Miletín
Věra Talášková, Šumperk
Antonín Sedláček, Znojmo
Dagmar Potišková, Hranice
Jaromír Štícha, Zvíkovec
Alfred Lotter, Havířov
Věra Novobilská, Ústí n.L.
Václav Tobiška, Hradec Králové
Věra Muchnová, Strakonice
Milan Smělý, Prostějov
František Šolle, Žandov
Miloš Šťastný, Rouchovany
Miloslav Šváček, Penčice
Josef Trojan, Praha
Jiří Vencel, Česká Třebová

Josef VONDROUŠEK

(1904-1995)

Honora membro de UEA kaj ĈEA forpasis antaŭ 20 jaroj.



Esperanton li ellernis en sia 18-a jaro kaj kiel 25-jarulo fariĝis kluba sekretario en Brno. Sub lia gvido la klubo tre vigliĝis, havis ĉirkaŭ 200 membrojn. Ĝis nun la kluboj tenas tradicion de regulaj prelegoj dum ĉiusemajnaj kunvenoj, kion li enkondukis. Li prizorgis ankaŭ plurajn koncertojn kunlabore kun profesiaj artistoj kaj kunorganizis tri tutŝtatajn kongresojn en Brno (1935, 1950, 1969). Inter la jaroj 1952-1989 li redaktis kluban bultenon, en kiu li sciis koncize karakterizi la plej gravajn Esperanto-eventojn de la jaro (nun ĉiuj numeroj legeblas en la kluba retejo).

Josef Vondroušek instruis historion kaj literaturon de Esperanto en Lančov kaj ekzamenis ilin ĉe la asociaj ekzamenoj. Li verkis ankaŭ broŝurojn **Historio kaj biografioj, Historie a spisovatelé.**

Liaj plej gravaj meritoj por la tutmonda Esperanto-movado estas liaj tradukoj el la ĉeĥa literaturo, ĉefe bonhumoraj: **Saturnin** de Zdeněk Jirotko, **Ĝojoj de mia vivo** de Jan Šmíd kaj libroj de Miloslav Švandrlík, nome **Edzinigbla knabino**, **Zorgoj de kronitaj kapoj** kaj **Marlupo kaj gaja vidvino**. Kaj infana libro **El notlibro de sankta Petro** de Jarmila Hašková, edzino de Jaroslav Hašek.

Li amis ankaŭ historiajn verkojn, kaj traukis ilin, nome **Malnovaj ĉeĥaj mitoj** de Alois Jirásek, **La propra biografio de Karolo la Kvara**, eseo de Václav Chaloupecký **Karolo la IV-a kaj Bohemio**, romanoj **Super valoj mateniĝas** de František Kožík kaj **Ŝtono kaj doloro** de Karel Schulz pri Mikelanĝelo. Inter liaj tradukoj ni trovas ankaŭ teatraĵojn **Ondro kaj drako** de Viktor Dyk, **Urso** de Ĉeĥov, **Aŭdienco** de Václav Havel, li provis eĉ poezian tradukon **Primoloj** (Petrklíče) de Svatopluk Čech. El Vítězslav Nezval li tradukis mallongan rakontadon **El mia vivo** kaj fragmenton el la komedio **Kaŝludo sur la ŝtuparo**.

Lia ĉefa kaj plej amata aŭtoro estis Karel Čapek. Dramoj **Afero Makropulos** kaj **El vivo de insektoj**, porinfana libro **Naŭ fabeloj**, bonhumoraj vojaĝpriskriboj **Italaj leteroj**, **Anglaj leteroj**, **Ekskurso en Hispanion**, trilogio de romanoj **Hordubal**, **Meteroro**, **Ordinara vivo**, filozofiaj bonhumoraj rakontoj **Libro de apokrifoj** kaj detektivaj **Rakontoj de la unua poŝo kaj Rakontoj de la dua poŝo**. Kiel ĉefverkon de Karel Čapek kaj de sia traduka laboro li konsideris satiran romanon **Milito kontraŭ Salamandroj**.

Aspektanta kiel 70-jarulo, sinjoro Vondroušek esperis, ke li ĝisvivos la Universalan Kongreson en Prago. Komence de decembro 1995 la kluboj festis lian 91-an jaron, sed tiam li jam plendis, ke li iomete malsanetas, eble lin atakas angino. Bedaŭrinde por lia alta aĝo ĝi estis mortiga kaj li forpasis la 6-an de decembro 1995.

-mm-

KLUBA VIVO

ČESKÁ TŘEBOVÁ ESPERANTSKÝ SILVESTR

29. 12. 2015 od 19. hodiny

malý sál Národního domu – Kozlovská ul.



1. Závazné přihlášky = celé jméno a bydliště, zasílejte laskavě na adresu:

jk.esperanto@seznam.cz, 721 869 054

Vstupné 220 Kč zasílejte na účet ČS. a.s. 183986123/ 0800. VS: 29122015. Do zprávy pro příjemce: vaše jméno/a/. Výjimky pouze po dohodě s ing. Kovářem, kovar.lad@email.cz, 602 483 265 vše do 14. 12. 2015

2. Včas přihlášeným zajistíme slavnostní přípitek a večeři. Alko a nealko nabídne restaurace tamtéž, platí každý osobně.

3. Soutěžní téma večera:

„Není pozdrav jako pozdrav“

4. K dobré náladě hraje muzikant Vojta a všichni zpíváme s ním!

5. Vánoční cukrovíčko? Ano, rádi ochutnáme!

6. Vesele přivítáme NOVÝ ESPERANTSKÝ ROK 2016!

7. Vtipné dárečky prosíme adresně popsat, dodáme adresátovi po půlnoci.

8. Skončíme nad ránem, ve 2 hodiny po půlnoci, s veselými vzpomínkami.

9. Do růžova se vyspíte na Internátě VOŠ a SŠ technická - areál Skalka, za 200 Kč os./noc. nadezda.vasinova@vda.cz, 465 508 449

Váš pozdrav bude jistě vřelý!

Těší se na vás „AMIKECO“ - esperantský kroužek celý!

Prostějov: La 5-an de novembro okazis eksterordinara kluba kunveno, kiu aprobis novan nomon „Esperanto Klubo Prostějov, z.s.“, novan statuton kaj novan estraron: prezidanto – Jaroslav Liška, bibliotekisto – Milan Smělý, kasisto – Jiří Kincl, konto-revizoro – Bedřiška Kaštilová, komitatano – Božena Danišová.



La klubanoj taskis al si por 2016 propagandi Esperanton en la urbo inter la junaj homoj, informi pri la kluba agado en la distrikta kaj esperantista gazetaro, okazigi aranĝojn en la klubejo kaj inviti gastojn el najbaraj kluboj kaj eksterlando por diskuti esperantlingve pri aktualaj temoj. Ekde la 16-a horo la klubanoj povos babibli dum konversaciaj vesperoj en la klubejo kun bufedo. Lunde tie kolektiĝos oldskoltoj ekde la 14-a horo. En la elementa lernejo Kollárova la klubanoj gvidos rondeton de Skolta Esperanto-Ligo por la lernantoj kun instruado de la internacia lingvo.

Brno: En la klubejo estis prezentitaj prelegoj: Ĉu Esperanto evoluas en la universalan lingvon de la scienco? 71-a IJK en Wiesbaden, SES en Martin 2015, Moluskoj, Antonín Zhoř kaj Eduard Štorch, Io el esoteriko, Josef Vondroušek, Amuza instruado. Ekde januaro 2016 okazos ĉiuj kunvenoj sole en Starobrněnská 15 (ne plu en Kohoutovice).

KALENDARO 2015

2015-12-29 Esperanta Silvestro en Česká Třebová,

Info: jk.esperanto@seznam.cz

KALENDARO 2016

2016-01-06/10 POLUDNICA

Info: www.poludnica.esperanto.sk

2016-04-11/17 Printempa Seminario en Skokovy

Info: drahotova@esperanto.cz

2016-05-(14) - Printempa Renkontiĝo de EK Šumperk

Info: kvidojanik@seznam.cz

2016-06-04 E-Tago en Pardubice

Info: pardubice@esperanto.cz

2016-06-18 Renkontiĝo en Havířov

Info: havirov@esperanto.cz

2016-06-19 Grimpado al Granda Ĉantorio

Info: suchanekj@seznam.cz

2016-07-19/23 Antaŭkongreso en Svitavy

Info: cea@esperanto.cz

2016-08-12/15 Renkontiĝo de ekstendaranoj en Lančov

Info: let.lancov@seznam.cz

2016-09-(17) Postferia renkontiĝo de EK Písek

Info: pisek@esperanto.cz

2016-10-14/16 aŭ 21/23 La 16-a ĈEA-Kongreso en Pelhřimov

Info: ces@esperanto.cz

2016-10 aŭ 11 - IEL Bartošovice

Info: verdastacio@gmail.com

2016-12-04 Marcipana Kristnasko

Info: svitavy@esperanto.cz

2016-12-10 Antaŭkristnaska renkontiĝo en Písek Info: pisek@esperanto.cz

Kompletigita versio aperos en sekva numero. Informojn sekvu ankaŭ en Kalendaro ĉe www.esperanto.cz.

ELEKTO DE GRAVAJ INTERNACIAJ ARANĜOJ EN 2016

2015-12-27/2016 01-03 La 14-a Novjara Renkontiĝo en Saarbrücken (Germanio)

Info: lu.esperanto@gmx.de

2016-05-13/16 Germana E-Kongreso en Munkeno

Info: kongreso@esperanto-muenchen.de

2016-05-21/28 La 68-a IFEF-Kongreso en Varna (Bulgario)

Info: bg_68IFK@abv.bg

2016-07/02-10 La 52-a Baltiaj E-Tagoj en Birŝtonas (Litovio)

Info: irenaa@takas.lt

2016-07-09/11 10a Jubileo de Herzberg a.H.-la Esperanto-urbo

Info: esperanto-zentrum@web.de

2016-07-16/23 La 89a SAT-Kongreso en Herzberg a.H.

Info: esperanto-zentrum@web.de

2016-07-16/23 La 72-a IJK en Vroclavo

Info: <https://www.facebook.com/events/1599159973664280/>

2016-07-23/30 La 101a Universala Kongreso en Nitra

Info: www.nitra2016.sk

2016-07-30/08-06 La 49a ILEI-Konferenco en Nyíregyháza (Hungario)

Info: mirejo.mireille@gmail.com

2016-08-20/27 La 83a Itala E-Kongreso en Frascati

<http://kongreso.esperanto.it/83/>

Pli detala daŭre kompletigata listo troviĝas en www.eventoj.hu/kalendaro.htm



Esperanto en amaskomunikiloj

La 6-an de aŭgusto 2015 Radio Pardubice elsendis intervjuon kun Lenka Angeľová, prezidantino de AEH en la programo *Máme hosty* (Ni havas gastojn), la intervjuon vi povas aŭdi ĉi tie:

<http://prehravac.rozhlas.cz/audio/3444746>

La 19-an de novembro 2015 la sama radio elsendis interparolon kun Libuše Dvořáková pri nia Esperanto-Muzeo en Svitavy:

<http://prehravac.rozhlas.cz/audio/3514919>

La 21-an de novembro 2015 Radio Brno en la programo *Mezi nebem a zemí* (Inter la ĉielo kaj tero) elsendis intervjuon kun Oldřich Arnošt Fischer el Esperantista klubo en Brno

<http://prehravac.rozhlas.cz/audio/3516126>

La 9-an de oktobro 2015 aperis gazeta artikolo pri Bartošovice (vidu p. 119)

Libro kun esperantlingva titolo

La ĉeĥa verkisto Miloš Urban (1967) eldonis novan scienc-fikian romanon **Urbo kune** pri fantazia urbo elpensita de aŭstria teoriisto, arkitekto kaj publicisto Jan Tabor (1944) kaj arkitekto Petr Hájek (1970). Sur p. 26 estas skribite, ke la titolo estis prenita el Esperanto kun senco „komuna urbo“, ideala ĉefurbo de la homaro. La arkitektoj invitis la verkiston por doni al ilia vizio literaturan formon. Eldonis Argo 2015, 368 paĝoj 10 x 16 cm. Belan legadon.

<http://www.membranecity.eu/>

Masaryk-universitato kaj Vikipedio

La 13-an de novembro 2015 subskribis Masaryk-universitato en Brno memordon pri kunlaboro kun la societo Wikimédie Česká republika kiel unua ĉeĥa altlernejo.

www.online.muni.cz/udalosti/6816-univerzita-se-spojila-s-encyklopedii-wikipedie

Por ni estas ĝojige, ke kiel la rezidento (komisiito) pri la kunlaboro estis nomumita esperantisto Marek Blahuš (1986), nia plej juna akademiano, kiu laboras en Centro de Lingva Klerigado ĉe la universitato.

La sekvan tagon okazis en Prago ĉeĥa Vikikonferenco, en kiu inter la aliaj prelegantoj parolis ankaŭ Marek Blahuš pri la kunlaboro:

<http://slideslive.com/wikipedia/wikikonference-2015>

Estas tie ankaŭ parolado de prof. Jan Sokol, kiu forte subtenas Vikipedion kaj estas aŭtoro de la projekto *Seniŝi píší wikipedii* (Emeritoj skribas Vikipedion), ĉar maljunaj homoj havas multajn sciojn, kiujn ili povus transdoni al juna generacio. Ne nur sciencajn sciojn, sed ankaŭ folklorajn (ekz. pri senplumigado de anseroj), kiuj alie baldaŭ malaperus, post kiam formortos lastaj memorantoj-atestantoj.

Pli detale ĉion klarigas prof. Sokol mem kaj ankaŭ Marek en alia sekcio de la retejo nomata *Masarykova univerzita ujíždí na Wikipedii* (Masaryk-universitato rajdas sur Vikipedio)

<http://slideslive.com/wikipedia/masarykova-univerzita-ujizdi-na-wikipedii>

Tie estas ankaŭ plurfoje menciita Esperanto.

-mm-

Jak platit svazu

Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 22 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Vr. Hirše seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:
(ukončení variabilního symbolu)

- 06940** členství ČES
- 06941** členství UEA
- 06942** předplatné Starta bez členství
- 06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944** poplatek UK
- 06945** kongres EEU
- 50400** komise pedagogická ILEI
- 50401** písemný kurs začátečníci
- 50402** písemný kurs pokročilí
- 50404** Paroliga kurso
- 50405** svazové zkoušky
- 50800** sekce nevidomých LIBE
- 50900** sekce zdravotníků UMEA
- 51000** sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100** sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 2700247564/2010
- 51200** sekce informatiky
- 70100** komise pro tisk a inf.
- 80200** ediční fond
- 80300** propagace v tisku
- 80400** fond Tilio
- 80500** virtuální *adresa@esperanto.cz*

Předplatné časopisů

Pozor! Změna adresy zprostředkovatele!

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady, tel. **723 672 335**, e-mail: polnickypavel@seznam.cz. Předplatné uhradíte na účet u Poštovní spořitelny v Poděbradech, č. ú. 231 798 902/ 0300, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

- Monato:** 1300,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 780,-Kč
- La Gazeto:** 640,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5
- La Ondo de Esperanto:** 700,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4, reta versio 440,- Kč.
- Juna Amiko:** 370,- Kč, v.s. 07004, 3 čísla ročně, 50 stran formátu A5
- Literatura Foiro:** 1280,- Kč (*840,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A 5
- Femina:** 870,- Kč (*580,- Kč), v.s. 07007, 4 čísla ročně, 28 stran formátu A4
- Heroldo de Esperanto:** 1330,- Kč (*870,- Kč), v.s.07006, 17 čísel ročně, 4 strany formátu A3
(vydávání HdE není zcela pravidelné!!!)

*cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".

Periodikum Českého
esperantského svazu, z.s. - 46.
ročník

Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,

starto@esperanto.cz

http://www.esperanto.cz/starto

Předplatné v Česku (bez členství ve
svazu): 200 Kč

Členská evidence a změny adres:

p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov 117,

683 04 Drnovice,

vratislav.hirs@esperanto.cz,

tel. 517 444 117

Uzávěrka příštího čísla: 1.2.2016

Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
- 46-a jarkolekto

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj
aŭ rekte ĉe nia Asocio

Abonprezo: 11 eŭroj, ekster

Eŭropo 13 eŭroj

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

elektronika versio PDF 6 eŭroj

Redaktoro: Miroslav Malovec,

Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,

Ĉeĥio, starto@esperanto.cz

http://www.esperanto.cz/starto

Presis: DTP centrum, Svitavy

Redakto-fermo de la sekva numero:

1.2.2016

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.

La 52-aj Baltiaj Esperanto-tagoj

La 2-10-an de Julio, 2016, Birštonas, Litovio

La urbo situas 40 kilometrojn for de Kaunas kaj 90 kilometrojn for de la ĉefurbo de Litovio Vilnius, apud la ĉefa rivero de Litovio Nemunas. Aliĝkotizo por ekssocialismaj landoj estas 45 eŭroj. Infanoj, lernantoj kaj studentoj ne pagas. www.esperanto.lt/aligxilo_BET.html
PREZOJ de loĝado, manĝado, pageblecoj kaj aliaj financaj kaj aliaj kondiĉoj estas troveblaj en retejo de la aranĝo.

GRAVE: Esperantistoj, kiuj grave kontribuos al la programo de la aranĝo por la loĝado (krom hoteloj) aŭ manĝado laŭelete ne pagos.

PROGRAMO: tradicia, t.e. somera universitato, paroligaj kaj perfektigaj kursoj, literaturaj aranĝoj, muzikaj kaj artaj vesperoj, debatoj pri situacio kaj problemoj de Esperantomovado en baltiaj landoj, tradukista kurso, pedagogia seminario, seminario de klubestroj kaj aktivuloj, movada lernejo, sciencteknikaj kaj fakaj aranĝoj, instruado de kantoj, junularaj aranĝoj, konkursoj, kvizoj, distraj programeroj, ekskursoj, ripozado en naturo, diskutoj, forumoj, libroservo, diservo, interkona vespero, baza konatiĝo kun litova lingvo kaj kulturo, ekspozicioj, filmoj kaj lumbildoj, gazetara konferenco, sportaj ludoj, oficiala malfermo kaj fermo, adiaŭa vespero.

KONTAKTADRESO: p.k. 167, LT-44287 Kaunas, Litovio, Litova Esperanto-Asocio. Poŝtelefonoj de LEA estas +370-687-12219 ; +370-686-69875. Telefakso estas: +370-37-228616. Retadreso de LEA estas:

litova.ea@mail.lt; irenaa@takas.lt;

pjedorovas@takas.lt. Retejo de BET-52 estas www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET52.

Belan
Kristnaskon
kaj sukcesan
jaron 2016





Partoprenantoj de E-lernejo Bartošovice



El nova ekspozicio – eksponaĵoj de Z. Novotná



*Urbestro de Ústí nad Orlicí salutas nian
asocian kongreson*



*Marie Čumová gvidas asociajn libroservon kaj
bibliotekon*



*Ján Přiborský rakontas pri vojaĝado de
nevidantoj, kiuj devas uzi palpadojn, flaradon
aŭ aŭskulti priskribon de la akompananto*



*Al la kultura programo de la kongreso
kontribuis Jan Duda kaj Miroslav Smyčka*